

NUN AŬ NENIAM

Esperantigo: Rovere Emanuele

muziko: Di Capua Eduardo – teksto: Capurro Giovanni

Nun aŭ neniam, ĉirkaŭbraku min, donu viajn kisojn ĉar mi amas vin.

Jam morgaŭ ne estos tempo plu. Nun aŭ neniam, la ŝanco por ni du.

Kiam mi vin vidis la unuan fojon, tuj mi enamiĝis, vi kaptis mian koron.

Viaj varmaj lipoj jam deziras kisojn, do ne atendu havi novan ŝancon.

Nun aŭ neniam, ĉirkaŭbraku min, donu viajn kisojn, ĉar mi amas vin.

Jam morgaŭ ne estos tempo plu. Nun aŭ neniam, la ŝanco por ni du.

Kvazaŭ plorsalikoj, ploros ni dumvive, se ni perdos amon, dediĉon reciprokan.

Kaj, en ĉi-momento, pligrandiĝas mia sento, ĉar realiĝas mia amorevo.

Nun aŭ neniam, ĉirkaŭbraku min, donu viajn kisojn, ĉar mi amas vin.

Jam morgaŭ ne estos tempo plu. Nun aŭ neniam, la ŝanco por ni du.